

Unu plia ĉefverko ĉe "Edistudio"

La konata internacia eldonejo "Edistudio" (c.p. 213, I-56100 Pisa, Italujo) prezentas nun al la publiko novan ĉefverkon de la internacia literaturo. En traduko de Pier Giorgio Soranzo, jam delonge kunlaboranto de **Heroldo de Esperanto**, aperas la romano **Materada**, de Fulvio Tomizza, itala aŭtoro naskiĝinta kaj vivanta ĉe la landlimaj regionoj inter Italujo kaj Jugoslavujo, kiu en siaj verkoj prezentas tre viglajn skizojn de la problemoj de ĉe-lima, plurlingva kaj plurkultura etoso. Temoj do tre karaj al la esperantistoj, kiuj certe tre favore akceptos tiun ĉi novan libron, kiu prezentiĝas en la kutima luksa vesto de ĉiuj titoloj de "Edistudio", en plena A5-formato, kun 160 paĝoj dense sed klare presitaj. La prezo, je kiu la libro estas disvendata estas nur 18 nl.gld, kaj ĝi estas disponebla ĉe ĉiuj plej ekipitaj Esperanto-libroservoj.

La libroservo de la el-



donejo jam nun plenumas mendojn laŭ la kutimaj kondiĉoj: sen aldono de sendokostoj por mendoj kun samtempa antaŭpago (pĉk 12230561 "Edistudio - Pisa" liroj 9.500, aŭ per ĉeko aŭ banko liroj 12.500), 33%

rabato por mendo de samtempe almenaŭ tri ekzempleroj (+ 10% por sendokostoj se kun postfaktura pago, nete se kun antaŭpago); ĝi ankaŭ akceptas telefonajn mendojn (+ 39/50/48670).

Edistudio - c.p. 213 - I-56100 Pisa - Italujo - pĉk 12230561 - tf. + 39/50/48670

Carl Stöp-Bowitz: 70

Josef Kavka (Ĉeĥoslovakio)

Sur la paĝoj de SR aperis jam du jubileaj artikoloj pri nia nuna prezidanto: de *B. Popović* (1973) kaj de mi mem (1978). Jen bonvenas nova okazo por resumi la tiamajn diraĵojn kaj por esence kompletigi la portreton de nia plej eminenta kolego, la «ISAE-ano n-ro 1».

Carl Stöp-Bowitz naskiĝis la 8-an de decembro 1913 en la norvega *Eidsvoll*. Kiel gimnaziano li partoprenis Esperanto-kurson en Oslo (1930), gvidatan de *Andreo Cseh*, kaj ekfunkciis en Klubo Esperantista de Oslo kiel ĝia sekretario, ekde 1933 krome kiel sekretario de Norvega Esperantista Ligo. La funkciojn li estis plenumanta ankaŭ dum siaj studoj universitataj. Li dediĉis sin al naturscienco kaj matematiko, speciale al zoologio. En 1939 li akiris la gradon de licenciato pri naturscienco. Samjare li fariĝis vicprezidanto de la supre nomita klubo (ekde 1940 ĝia prezidanto) kaj ekzamenkomisionano de NEL (1939-1945).

Longe li deĵoris kiel kuratoro de Universitata Zoologia Muzeo en Oslo. La unuan sciencon verkon (1941) li publikigis pri la norvegaj **gliceredoj**, t.e. familio de vermoj vivantaj marfunde. Jam per ĝi li demonstris kromalie seriozecon de sia Esperanto-aplikado: En la Eo-resumo, presita aparte, li pruvis, ke la zamenhofa lingvo perfekte taŭgas por esprimado de la plej subtilaj sciencaĵoj. La — de li mem genie inventita kaj enkondukita — scienca sufikso **-ed-** por la zoologiaj familioj, estas hodiaŭ ĝenerale uzata de la zoologoj-esperantistoj. Pionira ago estis lia esperantigo de la latinaj specinomoj (t.e. genronomoj plus speciaj epitetoj). En la resumo oni povas legi ekz. pri **gliceroj (kapa, ŝtona, blanka), goniadoj (makula, norvega, pala)**; interesa estas la priskribo de la **epitokeco**, t.e. aliaspektiĝo de la seksmaturiĝantaj vermoj; ne malpli kaptas la leganton la priskribo de la ŝtongliceraj movoj k.t.p..

Sekvis la **ofeliedoj** (1945) kaj samjare la **skalibregmedoj**, ree familioj de marfundvermoj. Estas imageble, kun kioma zorgo la verkinto prilaboris ne sole la francan tekston, sed ankaŭ la aparte presitajn esperantlingvajn resumojn. **Ofelino norvega**, ekz., havas jenan diagnozon: «korpo rigida, longa, ne maldikiĝanta je la ekstremaĵoj, ventra sulko tre klara. 55-61 fetojn por-

tantaj segmentoj. Segmentoj kun malfortaj ringoj. Kapeto (*prostomium*) mallonga, sur kies ekstremaĵo troviĝas palpileo, ofte plidikiĝanta antaŭe. Du nukaj organoj grandaj.» K.t.p. **Polifizio dika**: «La specio estas konebla per la kolbasforma korpo kaj duloba kapeto.» K.t.p. La profunde observe-ma zoologo pruvis, ke kun tiu ĉi specio identas la pli frue priskribitaj *Lipobranchius Jeffreysii* (McINTOSH) kaj *Polyphysia quaterbranchiata* FURREG. Ĉu do *Stóp-Bowitz* estas pli konsiderinde zoologo ol esperantisto? Neeble distingi, ĉar ambaŭ aktivad-sferoj absolute ekvilibras en lia persono!

Post la mondmilito, *Stóp-Bowitz* meritegas pri restarigo de ISAE, fariĝinte prezidanto de ties provizora estraro dum la periodo 1946-1949. Ekde 1947 li funkciis ankaŭ kiel prezidanto de NEL.

Dume neniel postrestis lia laŭsistema esplorado de la marfundvermoj: en 1948 aperas la **flabeligeredoj**, distingataj «per la ĥetoj aŭ haregoj (*setae*, *chaetae*) artikplenaj kaj per la ĥetoj de la antaŭaj segmentoj direktataj antaŭen, formantaj “kapkaĝon”.» La verko temas pri jenaj genroj (specioj): **flabeligero** (alfiksa), **feruzo** (pluma, **flabeligereca**, **arkta**, **falĉila**), **diploĉiro** (**blugriza**, **hirta**, **longĥeta**), **brado** (**vila**, **sulketa**, **senkapabla**, **krusta**, **grajno-plena**).

La sama jaro alportis du sciencaĵojn: pri arktaj poliĥetoj kaj pri tiuj de la nordatlantika produndmara ekspedicio «*Michael Sars*» (1910). En tiu ĉi temis pri 75 specioj, apartenantaj al 51 genroj kaj 20 familioj. Kvin specioj estis tute novaj, unu el ili formas novan genron. La ĉefparton de la materialo konsistigis pelagaj specioj el jenaj familioj: **afroditedoj** (subfam. polinoe-noj), **folidorsedoj** (subfam. lopadorinĥenoj), **alciopedoj**, **tomopteredoj** kaj **tifloskolecedoj**. La pelagaj specioj troviĝis laŭ la tuta vojo de l' ekspedicio, dum la fundaj precipe laŭ la bordoj de Eŭropo kaj Afriko. Temis pri jenaj familioj: **hezionedoj**, **silisedoj** (subfam. silisennoj), **nereedoj**, **neftisedoj**, **gliceredoj**, **eŭnicedoj** (subfam. eŭnicenoj), **onufenoj**, **lumbrikonereenoj**), **filonedoj**, **spiedoj**, **flabeligeredoj**, **ofeliedoj**, **maldanedoj** (subfam. eŭklimene-noj), **terebeledoj** (subfam. terebelenoj, kaneforenoj), **sabeledoj** (subfam. sabelenoj), **serpuledoj** (subfam. serpulenoj). En la ĵusa verko, *Stóp-Bowitz* eksplicite mencias, kiel Esperanto utilis al li: s-ro *Marini* estis sendinta al li Eo-tradukojn de la traktadoj, publikigitaj itallingve (*Rosa*), do alimaniere apenaŭ alireblaj por la norvega zoologo.

La pelagaj poliĥetoj estas temo same de la plua artikolo (1949), koncer-nanta materialon el la norvegaj antarktaj ekspedicioj de «*Norvegia*». Jen ni renkontiĝas kun la familioj, konataj al ni de supre: **folidorsedoj**, **alciopedoj**,

tomopteredoj, **tifloskolecedoj**, **neftisedoj**. La materialo entenis 8 pelagajn kaj 1 fundan speciojn.

Ĝ Dank'al la persista klopodo de sia provizora estraro, ISAE fine sukcesis (15.3.1949) aperigi la 1-an n-ron de SCIENCA REVUO. *Stóp-Bowitz* inaŭguris ĝin per jenaj vortoj: «Karaj kunlaborantoj! En nia moderna socio la sciencoj ludas ĉiam pli gravan rolon. La sciencistoj estas multrilate la gvidantoj de la homa socio. La scienco estas esence internacia; sed la diverseco de lingvoj estas grava baro por la libera kaj natura evoluado de sciencoj; en ĉiam pli multaj landoj la sciencistoj emas skribi siajn verkaĵojn en sia nacia lingvo. Ni esperantistaj sciencistoj havas potencon rimedon por venki ĉi tiun baron, sed ni devas konvinki ankaŭ niajn kolegojn pri la grandaj avantaĝoj, kiujn Esperanto prezentos al ili.» K.t.p.

Ekde 1949 *Stóp-Bowitz* fariĝis direktoro de la sekcio por prononcado, en Akademio de Esperanto.

Denove (1951) la pelagaj poliĥetoj prezentis esplor-objekton al *Stóp-Bowitz*, ĉi-okaze el la materialo de la sveda antarkta ekspedicio.

Samjare aperis grava esperantlingva artikolo, en kiu *Stóp-Bowitz* esprimas sian starpunkton al la propono de A. Albault (SR, 3, 1, 28-31, *Purmerend*) pri kelkaj sufiksoj sistematikaj kaj priskribaj en biontologio: «Propo-nante novan sufikson, ĉu ĝeneralan, ĉu fakan, oni devas atenti: 1e. La princi-pojn, laŭ kiuj d-ro *Zamenhof* formis la Esperantajn sufiksojn; 2e. la inter-naciecon de la proponata sufikso; 3e. La neceson de aŭ bezonon pri la pro-pinata sufikso.» Koncerne la zoologian sistematikon, d-ro Albault proponis por la familioj la sufikson -ide-, por la subfamilioj -ine-. *Stóp-Bowitz* atentigas, ke jam antaŭ pluraj jaroj li estis proponinta tiucele -ed- kaj -en-, kiuj trovis vastan aprobon flanke de zoologoj-esperantistoj kaj eniris la vorta-röjn (PV, PIV).

Okaze de la 37-a Universala Kongreso de Esperanto en Oslo (1952), *Stóp-Bowitz* fervore laboris kiel la prezidanto de LKK; interese, ke la norvega In-stituto por Atomenergio afable permesis viziton de proksimume 20 kongre-sanoj (inĝenieroj kaj sciencistoj) al la instituta reaktoro. En la samjara SR, 4, 1, 14 ni trovas jenan sciigon de la vicprezidanto kaj delegito de ISAE por Norvegio: «Mi informas ke mi jam de preskaŭ 20 jaroj laboras pri zoologia sistematika terminaro. Ĝi estas jam tiom progresinta, ke mi esperas post la kongreso trovi tempon por finpretigi manuskripton pri ĝi por publikigo. Mi volonte kunlaborus en terminologia sekcio, kaj pretus estri eventuale zoolo-gian fakon.» Okaze de la ĵus nomita kongreso (5.8.1952), 65 sciencistoj (in-

ter ili *Stóp-Bowitz* kiel la membro de la prezidantaro) subskribis rezolucion, alvokantan, ke UNESKO objektivite esploru la rezultojn, atingitajn de Eo. Samdate, *Stóp-Bowitz* prezidis la jarkunvenon de ISAE kaj post du tagoj la ĝeneralan kunvenon en la universitata medio (v. SR, 4, 4, 148-151. *Purmerend*).

En 1953, li partoprenis la 14-an Internacian Zoologian Kongreson en Kopenhago.

Eksterordinare interesan artikolon en populariga stilo verkis *Stóp-Bowitz* pri la lumbrikoj. Ĝi aperis en SR (1955); oni povas legi tie pri l' anatomio, fiziologio, sistematika pozicio, diagnozaj trajtoj de lumbrikoj (aloloboforoj, ejsenoj, dendrobenoj), iliaj vivmaniero, signifo pro terkulturado, bredado k.t.p. Estas interese menciĝi, kial la specialisto pri maraj polihetoj fransiris por longa tempo al la tervermoj: dum la milito li simple ne povis iri sur la maron; tial li serĉis parencon animal-grupon surteran. Poste li ja revenis al siaj polihetoj.

Enkadre de la 41-a UK en Kopenhago (7.8.1956), ISAE okazigis specialan kunvenon por festi la 50-jaran jubileon de sia ekzisto. *Stóp-Bowitz*, la vicprezidanto de ISAE, bonvenigis la multnombrajn ĉeestantojn kaj akcentis, ke la scienco, same kiel la muziko, estas universala kaj tial ĝi bezonas komunan lingvon. Li informis, ke ISAE eldonos, okaze de sia jubileo, verkon de ĉ. 250 grandformataj paĝoj. Ĝia provizora titolo estos SCIENCAJ STUDOJ, kaj en ĝi promesis kunlabori multaj sciencistoj-esperantistoj. Sekvatage, *Stóp-Bowitz* prezidis la regulan jarkunvenon de ISAE, same kiel tiun enkadre de la 42-a UK (Marsejlo, 6.8.1957).

Por establi Eo-grupon ĉe la 15-a Internacia Zoologia Kongreso, okazonta dum la tagoj 18. — 31.7.1958 en Londono, li publikigis en SR alvokon al la zoologoj-esperantistoj.

Kelkiam estas enigme, kiel troviĝis necesa tempo, se *Stóp-Bowitz* kapablis plenumi sian ĉiuspecan aktivadon por Eo. Ekz., enkondukante la ISU-prelegon en Kopenhago (1956, aperintan en SR, 1958), li diris: «En la internacia kulturaranĝo de la Sveda Esperanto-Instituto en *Frostavallen* dum la pasinta semajno mi faris prelegserion pri rasoj kaj rasaj antaŭjuĝoj. Preparante tiujn prelegojn mi ekhavis la emon prezenti al la esperantista publiko ankaŭ la devenon de la nuna homo.» En la sama n-ro de SR aperis alia ISU-aĝo (tiu de Marsejlo, 1957): «La parenceco inter vertebruloj». Ambaŭ estas veraj iuveloj de la popularscienca literaturo en Eo, liverante provizon da multnombraj fakaj terminoj kiel fidindan bazon por pluaj verkontoj pri la temo.

En la supre menciita jubilea kolekto SCIENCAJ STUDOJ, eldonita de ISAE en Kopenhago (1958) aperis lia kontribuado pri du polihetoj, unu nova por Norvegio: goniado pala *ARWIDSSON, 1899*, alia tute nova por la scienco: ofelino modesta sp. n. Tiu ĉi estas detale priskribita kaj desegnita.

Dum la 47-a UK en Kopenhago (1962) okazis Unua Internacia Konferenco pri la lingva problemo en la scienco. Tiam *Stóp-Bowitz* aktivis en du sekcioj: pri Internacia Eo-Universitato kaj pri lingvaj problemoj en la biologiaj kaj agronomiaj sciencoj. En la dua sekcio, li havis enkondukan prelegon: Kiel nomi la organismojn? Ĝi aperis post unu jaro en SR. La publikigita prelego mem dokumentas, kiom profunde pripensis ĝia aŭtoro la koncernan problemaron. Prave li proponis malsaman traktadon de la genronomoj unuflanke kaj de la speciepitetoj aliflanke. Ĉion ĉi devus tre zorge konsideri la verkontoj pri esperantigo de la biologia nomenklaturado.

En SR 1964 aperis la brusela ISU-prelego de *Stóp-Bowitz*: La eŭropa angilo tute ne frajas! — interese kaj streĉanta atenton, simila al detektivaĝo...

En 1965, la akademia triopo: *Setälä — Vilborg — Stóp-Bowitz* aperigis gravan studon baze de la Fundamento. La plej ampleksa ties parto venis el la plumo de *Stóp-Bowitz*: Esperanto — lingvo de moderna tipo. Ĝia aŭtoro pruvis, ke el strikte sciencaj vidpunktoj li kapablas esplori ne sole zoologian, sed ankaŭ lingvistikan temon. Li konkludas, ke la tempa sistemo de la verboj pli bone ol la aspekta sistemo harmonias kun la tuta strukturo de Esperanto kiel lingvo de moderna tipo.

Post kelkaj jaroj da gimnazia lektorado, *Carl Stóp-Bowitz fariĝis en 1966 profesoro de zoologio ĉe Universitato de Oslo*. Per tio estas ankaŭ formalejure konfirmata la delonge fakta apogeo de lia zoologia kariero.

En SR 1966 aperis lia tokia ISU-prelego de 1965: Ĉu organismoj travivis la glaciepokon en la nordo? Jen interesaĝo ne sole por la zoologoj kaj botanikistoj, sed ankaŭ por la geologoj, paleoekologoj k.a. specialistoj. Prof. *Stóp-Bowitz* esprimas la opinion, ke malmultaj animal-grupoj estas pli konvenaj ol la lumbrikedoj por akceli nian komprenon pri travivado kaj enmigrado. La teorion li dokumentis pli detale en sia anglalingva traktaĝo, kiun publikigis *Pedobiologia* (1969). Samjare kaj samlingve aperis lia verko pri la sistematiko kaj zoogeografio de la norvegaj tervermoj (anelidoj, oligohetoj, lumbrikedoj), lia doktoriĝa disertaĝo.

Fine de la 60-aj jaroj li estis ĉefkunlaboranto pri zoologio en PLENA ILUSTRITA VORTARO (1970).

En 1969 okazis mia unua rendevuo kun prof. *Stóp-Bowitz*, nome en la

praga loĝejo de d-ro *Zázvorka*. Estis por mi profunda impresio, persone renkontiĝi kun tiu ĉi eminenta sciencisto, kies interesajn artikolojn mi estis leginta sur la paĝoj de SR kaj kies sobraj opinioj pri scienca rolo de Eo trovis ĉe mi tre pozitivajn reeĥojn. Dum tiu malgajvetera printempa tago nia triopo entreprenis ekskurseton al la pentrinda lidit-kanjono de l'okcidentpraga periferio. Mi kurte skizis — en Eo — tiean geologian situacion. Poste ni vizitis d-ron Pumpl en lia praga loĝejo. Ĝue mi aŭskultis dialogon de la du Esperanto-akademianoj.

La unua korespondaĵo, kiun prof. *Stop-Bowitz* adresis al mi, portas la daton: 2.7.1969. Ĝis hodiaŭ amasiĝis tiom da leteroj, ke oni povus plenigi per ili pli ol unu dikegan libron. Verdire mi povas nomiĝi bonŝanculo, ĉar mi akiris du unikajn «instruistojn». De d-ro *Pumpl* mi lernis multon utilan pri la gramatiko kaj stilo, de prof. *Stóp-Bowitz* multon pri la naturhistorio, terminologio, geografia nomenklaturado kaj pri aliaj leksikologiaj aferoj.

Nia konkreta kunlaboro komenciĝis super POŜATLASO DE LA MONDO. Kvankam superŝutita de siaj profesiaj kaj poresperantaj taskoj, li ne rifuzis mian peton (de 21.10.1969) kaj ofereme alpaŝis al intensa (ofte eĉ teda) recenzado de la manuskriptoj. Kvankam li antaŭe membris en sistempa Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj, li ne hezitis aserti (17.11.1969), ke ĝiaj rezultoj estis sole proponoj, ke plej bonaj nomformoj ne povas esti atingataj per voĉdonado de la komisionanoj k.t.p. Li esprimis la kredon, ke la poŝatlaso, aperonta el iniciato de neesperantista kartografia eldonejo, estos pli homogena kaj pli bona ol MONDMAPO (1968). Li skribis: «Efektive mi havas nur tre malmultajn rimarkigojn al viaj proponoj, kiuj multrilate ŝajnas al mi pli feliĉaj ol tiuj de nia Komisiono. La geografiajn nomojn oni povas dividi en 3 kategoriojn: 1. Kelkaj nomoj havas tradician Eoformon, plej ofte proponitan de *Zamenhof* sur bazo de latina formo de la originala nomo, ekz. Varsovio. Tiaj nomoj ĉiukaze estas malmultaj.

2. Nomoj el landoj kun ne-latinliteraj lingvoj. Tiujn nomojn oni redonu en Eo laŭeble laŭ la prononco, sed se iu nomo havas jam pli-malpli internacie akceptitan formon en latinaj literoj, oni devas iagrade atenti ankaŭ tiun formon.

3. Nomoj el latinliteraj lingvoj. Transskribante tiajn nomojn oni devas atenti **kaj** la lokan prononcon **kaj** la originalan ortografion. Geografiajn nomojn oni rekonas antaŭ ĉio per la ortografio. Ekz. la ortografi-proksima Salisburio (por *Salisbury*) estas preferinda al la pli prononc-proksima Salsbrijo, kiun proponis la Komisiono.»

Do, ĉu oni povas imagi pli utilan konsilon? Ĝuste la konciza kaj kune traŝa formulado de ideoj, jen kio ravas min ĉe prof. *Stóp-Bowitz*. Okaze de la poŝatlaso, lia kontribuo estis sendube grandega: **la verkon li plibonigis esence**; tion oni prave emfazas en ĝia antaŭparolo (1970). Li proponis tre taŭgajn nomojn, ekz. Bonespero por *Godthåb*, Longjarurbo por *Longyearbyen*, Mariohaveno por *Maarianhamina*. Multajn nomformojn li lerte modifis, ekz. Admiralitata insularo, Aleutoj, Ceramo, Edĝa insulo, Elesmera insulo, Ĵamaiko, Nordkina kabo, Rjukjuaj insuloj, Saudarabio, Sejĉeloj, Svalbar-do. Li prave atentigis nin pri ĝustaj zamenhofaj formoj. En FUNDAMENTA KRESTOMATIO, 16-a eld., p. 262 troviĝas Munĥeno (ne «Munkeno»), p. 61 malgrandruso (ne «maloruso»), do devas esti ankaŭ Blankrusa SSR (ne «Belorusa»!). Memkomprene mankus loko por elnombri ĉiun detalon de lia krea kontribuo al la poŝatlasa verko.

En SR (1969) aperis la ISU-prelego el Helsinko (1969): Birdetoj kiel ekstermantoj de insektoj. Jen aktuala temo, interesa por ornitologoj, forstistoj, terkulturistoj k.a. Krome tre bone impresas la esperantigita nomenklaturado (ekz. panolo flama, bupallo pina, limantrio monaĥa, dendrolimo pina, sturno vulgara k.m.a.).

En 1970 li doktoriĝis per disertaĵo pri la norvegaj lumbrikedoj; pri tio li skribis al mi en la letero de 4.8.1970. Mi respondis (8.9.1970): «Kun granda ĝojo mi eksciis pri via doktoriĝo, gratulas plej sincere kaj fieras, ke meze de nia movado elstaras tiaj eminentuloj. Via scienca verkado ja efikas por la progreso de Eo pli ol multaj bruaj kampanjoj...»

Speciale pri esperantigo de la latina zoologia nomenklaturado okupiĝas prof. *Stóp-Bowitz* en SR 1971, kompletigane tiel la prelegon de 1962, publikigitan en 1963. Li emfazas nun, ke Esperanto nepre bezonas sciencajn nomojn por ĉiuj organismoj. Li esprimas jenan opinion: Kiam Esperanto estos ĝenerale akceptita kiel la internacia lingvo en ĉiuj rilatoj, sendube efikos kiel malpraktika arĥaikaĵo uzadi la latinajn aŭ latinformajn nomojn sciencajn por la organismoj. Ni citu laŭvorte: «Mi opinias, ke ellaborante Esperantajn nomenklaturajn biologiajn oni devas, same kiel procedas la ellaborantoj de ĥemiaj kaj aliaj natursciencaj terminaroj, baziĝi sur la hodiaŭaj internaciaj nomenklaturaj.» Denove kaj sur grava kampo montriĝas do la realisma sento de prof. *Stóp-Bowitz*; prave li rifuzas ekstremajn tendencojn de iuj esperantistoj. Unu el tiuj ekstretoj estas rezignado pri Esperanto-nomenklaturado kaj kontentiĝo pri la latina. Alia ekstremo estas kreado de tute nova Esperanto-nomenklaturado, sendependa de tiu, kiu estas nun internacie agnoskata.

En 1972 denove renkontiĝis la du malnovaj amikoj-muzeologoj: d-ro *Zázvorka* vizitis Norveĝion kaj prof. d-ron *Stóp-Bowitz*.

Depost mia elekto en la funkcion de la ĝenerala sekretario de ISAE (1972), mi tre ofte korespondadis kun prof. *Stóp-Bowitz* pri ĉiutagaj taskoj de nia asocio. Li estis modela estrarano, kiu neniam rifuzis helpo sur tiu kampo. Sian vicprezidantan funkcion li plenumadis kun serioza respondeco. Ĉar same li kutimas sinteni al ĉiuj siaj funkcioj, neeviteblas lia senĉesa troŝarĝiteco. Tiu laŭgrade pliiĝadis; ekz. en 1972 aperis lia unua kursoteksto por SUK: Bazaj nocioj de biologio, kaj ekde 1973 li fariĝis prezidanto de SUK (Someraĵaj Universitataj Kursoj) en Lieĝo; en 1974 li elekto en vicprezidanto de UEA kaj ekde tiu jaro li partoprenadis ĉiujn UK escepte de la brazila (1981); en la estraro de UEA oni ŝarĝis lin per gravaj taskoj: li zorgu pri faka agado, pri delegita reto... Kiel li sukcesis ampleksi ĉion ĉi?

En 1974, la zoologoj-specialistoj povas ekstudii lian anglalingvan verkon pri lumbrikedoj de *Hardangervidda* (okcidenta Norveĝio). Sed samjare aperis tri liaj SUK-tekstoj: Enkonduko en ĝeneralan biologion, Elementa ekologio, Segmentumitaj animalaj grupoj. (Bedaŭre mi ne posedas ilin, tamen povas imagi, kun kia didaktika talenteco kaj lingva precizeco ili estas kompilitaj...).

Samjare publikigis SR lian tre valoran traktaĵon zoogeografian. La temo premias ne sole ĝisfundajn sciojn el la kampoj zoologiaj (sistematiko, filogenezo, zooekologio, paleozoologio), sed ankaŭ solidan pripensan leksikologian por ellaboro de taŭgaj Eo-terminoj. Abundas tie bonŝancaj esperantigoj de la zoologiaj nomoj (feliso unukolora, kaniso lupo, sfenodonto punkta, iksodo ricina, sirhanto paradoksa k.m.a). Ja oni aljuĝis al prof. *Stóp-Bowitz* — pro ĉi traktaĵo — la unuan premion de *Popović*, destinitan por la plej bona SR-artikolo (1975). En la sama jaro venis al li la premio de *Josefina Larsson*: la stokholma Pac-societo aprenis per ĝi lian agadon cele al lingva kompreniĝo en la mondo. Prave, prave!

Plua SUK-aĵo: Elementa zoogeografio (1976) kaj samjare nova SR-aĵo — ISU-aĵo, prelego en kadro de la 60-a UK en Kopenhago: La natura ekonomio de la maro. En ĝi, prof. *Stóp-Bowitz* klopodis montri, kiel funkcias la maro, la gravega ekosistemo. Li priskribis la maran nutroĉenon, komencinte per la fotosintezanta fitoplanktono en la supraj tavoloj kaj fininte per la organismoj marfundaj. Li ne preterlasis plurajn demandojn praktikajn, ekz. kiel oni povus, per la helpo de maraj vegetaĵoj, sensaligi salajn lagojn, do fari ilin fruktodonaj.

Dum 1976 kaj 1977 li estis direktoro de Zoologia Instituto ĉe Universitato en Oslo, reelektiĝis ankaŭ por 1977, sed rezignis pri reelekto pro 1978; dume, ekde 1977 li fariĝis prezidanto de Eldonejo Esperanto A/S. En 1977 — post 30 jaroj da prezidantado — li rezignis pri reelekto por tiu funkcio en NEL.

La verko pri **pelagaj polihetoj** el la ekspedicioj de «*Wilhelm Barendsz*» kaj «*Snellius*» estas prezentita en du lingvoj: franca kaj Esperanto. Do, neniuj sciencistoj, interesataj pri la temo, povas pretervidi ĝin kaj ne konvinkiĝi propraokule, ke Eo plene taŭgas eĉ por la plej specialaj aferoj. Temas pri polinoedoj (antinoelo), lopadorinĥedoj (lopadorinĥo, pelagobio), alciopedoj (vanadisoj, alciopumo, kronio, rinĥonerejoj), tomopteredoj (tomopteroj), tifloskolecedoj (tifloskoleco), traviziopso). Se pluraj zoologoj insistus same kiel prof. *Stóp-Bowitz*, ke iliaj verkoj estu esperantlingve almenaŭ resumitaj, baldaŭ evidentiĝus avantaĝeco de tiaj resumoj kompare kun la nacilingvaj.

Samjare aperigas SR la ISU-prelegon el Ateno: Kial kelkfoje maraj moluskoj fariĝas venenaj? Denove, prof. *Stóp-Bowitz* atestas pri sia talento, interese rakonti, ĉi-okaze pri kapablo de iuj algoj (dinoflageluloj, ekz. gimnodinio mallonga aŭ goniaŭlago poliedra) produkti en siaj kolorgrajnoj (ĥromatoforoj) — venenon! Kelkiam la kvanto de tiaj algoj fariĝas tre granda, la marakvo fariĝas ruĝbruna aŭ ruĝa («ruĝa tajdo») kaj povas kaŭzi amasmortadon de fiŝoj kaj aliaj animaloj. Aliokaze la venenoj povas amasiĝi en manĝeblaj moluskoj, ekz. mituloj kaj ostroj. Tiam la kulpantaj dinoflageluloj estas **goniaŭlagoj kateneta, tamara kaj senkateneta**. Precipe interesa estas la priskribo de eksperimentoj pri kulturado de la venenaj algoj. Apartan atenton dediĉas prof. *Stóp-Bowitz* al venenaj moluskoj de la norvega bordo.

En 1978 prof. *Stóp-Bowitz* faris prelegojn en 3 finnaj universitatoj kaj en 1979 li partoprenis la simpozion en *Marilia*, post kiu li faris prelegvojaĝon fra 6 sud-amerikaj landoj, prelegante pri biologiaj temoj en Esperanto kun traduko.

Tre malfacila situacio por ISAE estiĝis aŭtune 1977, kiam necesis prepari elekton de nova estraro por la periodo 1978-1980. Oni devis serĉi novajn prezidantojn kaj ĉefredaktorojn de SR (pri ambaŭ funkcioj rezignis prof. *Popović*, malsana kaj laca), sekretarion-kasiston k.a. Prof. *Stóp-Bowitz* solidare partoprenis kun mi grandan parton de tiu zorgoplena agendo. Fine ni sukcesis trovi «provizoran solvon por la provizora periodo», kun la intenco iel transiri al «pli definitiva» estraro por la laŭstatuta periodo kvinjara (1981-1985). Memkomprene, apenaŭ pli facila estis kompilado — post la tri jaroj

— de tiu nova kandidatlisto, sur kiu figuris denove prof. *Stóp-Bowitz*, sed ĉi-foje kiel la prezidanto de ISAE, kaj sur kiu mi mem fine sukcesis liberiĝi de la peza ŝarĝo, la ĝeneral-sekretaria.

La 22-an de januaro 1981 mi skribis al prof. *Stóp-Bowitz*: «Kara amiko, mi rapidas por gratuli al vi — espereble kiel la unua — pro via ISAE-prezidantiĝo. Samtempe mi kredas, ke viaj organiza talento kaj persistemo venkos la barojn, kiuj objektivite amasiĝis kontraŭ prosperado de ISAE.»

Post tiu dato rekomenciĝis por prof. *Stóp-Bowitz* la plej intensaj klopodoj, celantaj rebonfartigon de ISAE.

La 17-an de junio samjare li skribas al mi: «Mi estis ege okupita lastatempe, parte pro Norvega Eo-kongreso ĵus okazinta, parte ĉar mi administras aĉeton kaj aranĝon de domparto, kiu estos la norvega Eo-centro. En ĉi tiuj tagoj okazas la translokigo».

La 7-an de aŭgusto mi finis mian leteron «per firma deziro, ke vi, helpate de l' estraranoj, sukcesu refunkciigi la 'rustiĝintan motoron' de ISAE, kiu ĉiam ankoraŭ obstine grincas, malgraŭ niaj lacigaj klopodoj...».

Meze de sia streĉa agendo, prof. *Stóp-Bowitz* sukcesis «elrompi» iom da tempo kaj trastudi mian artikolon «Onomastiko en fakterminoj konsidere ilian esperantiĝon». La 30-an de novembro li skribis al mi: «Kun tre granda intereso mi legis vian manuskripton pri la Onomastiko, kun la enmetita pledo por la konservo de ĥ, kiun mi plene subtenas... La norvega *kj*, sveda *tj* prononciĝas kiel germana *ch* en «*ich*» kaj povus bone fariĝi ĥ... *Zamenhof* konsilis preni nomojn de bestoj kaj plantoj el la 'latinaj' nomoj, kaj ofte oni senkritike prenis jen genran, jen specian nomon por laika uzo, kio kreis problemojn. Mia opinio oni devas konscii, ke ni bezonas kaj laikajn nomojn, kiuj ofte ne respondas precize al sciencaj nocioj, kaj sciencajn nomojn precizajn. La laikajn oni klopodu ĉerpi el naciaj lingvoj, atentante al laŭebla inernacieco, ekz. hundo, ĉifĉafo. Por scienca uzo servas la latinforma nomenklaturado, kiu tamen fariĝis tre malfacila por modernaj homoj, kiuj neniam scias latinon, kaj mi proponas ĝian esperantigon. Kun ĝojo mi konstatas, ke vi en viaj ekzemploj grandparte sekvas miajn liniojn, aŭ, ke ni ambaŭ sekvas samajn liniojn. Grandparte nur kiam temas pri nomoj prenitaj el personaj nomoj aperas dilemoj. Mi provizore solvis (aŭ pli bone: ne solvis) tiun demandon ne ŝanĝante la ortografion de la persona nomo, aldonante simple nur apostrofon kaj -a: Ekz. Fulmaro glacia *Rodgers' a*, atendante la solviĝon de la onomastika problemaro. Sed via teksto estas klara pledo por unuebla solvo, kiun mi nepre konsideros. Cetere, mia opinio oni devus ne nomi

speciojn nur laŭ persono, tio diras nenion pri la besto, kaŭzas prononcajn problemojn, kaj krome laŭ la regularo estas devige kripligi la nomojn. En la anatomia nomenklaturado tiaj onomastikaĵoj malpermesiĝis okaze de la lasta revizio, kaj mi revas, ke iam tio okazu ankaŭ en zoologio! Sed ĝuste la junaj zoologoj, ne sciante latinon, trovas tre simple nur aldoni genitivan -i al persona nomo, kaj samtempe oni «honoras» sian profesoron! Mi neniam elektis tiun vojon, kaj malpermesus, se iu petus permeson nomi specion laŭ mi! Pri genraj nomoj la afero estas malpli grava, tie oni devas simple esperantigi laŭ onomastikaj reguloj. Sed ankaŭ genrajn nomojn el personaj nomoj mi neniam kreas.» La sciencistoj (ne sole esperantistaj) povus do multe instruiĝi pri serioza kaj konsekvenca alpaŝo al solvado de nomenklaturaj problemoj.

La plej freŝdata publikigaĵo el la plumo de prof. *Stop-Bowitz* estas la ĉapitro pri polihetoj en *Atlas del zooplancton del Atlantico Sudoccidental y métodos de trabajo con zooplancton marino* (1981). La Eo-resumo informas nin pri 6 familioj de polihetaj anelidoj pelagaj (pontodoredoj, lopadorinheoj, iospiledoj, alciopedoj, tomopteredoj, tifloskolecedoj). La plimulto de la pelagaj polihetoj sin nutras per zooplanktono, nur iospilo per diatomoj, dum la tifloskolecedoj ŝajnas esti duonparazitaj. Nur la alciopedoj estas kapablaj naĝantoj, la ceteraj estas adaptiĝintaj al vivo flosanta. Ĉiuj estas plimalpli transparentaj, nevideblaj en la akvo. Ankaŭ la grandaj okuloj de la alciopedoj devas esti konsiderataj kiel adaptiĝo al vivo planktona.

En 1982 li redaktis biologian suplementon de HEROLDO DE ESPERANTO.

Ankaŭ dum 1982-1983 daŭras nia abunda korespondado — ĉu oficiale estrarana, ĉu koncernanta sole problemojn, momente konsideratajn de ni ambaŭ. Grandan zorgon ĉiam kaŭzas ekz. la financado de SR. Multe da energio elspezis prof. *Stóp-Bowitz* por akiri subvencion de UEA.

En la plej freŝdata letero (de 3.6.1983) li informas min pri sia nuntempa esplorado: pelagaj polihetoj el Gviena golfo. Dum mi finas ĉi tiun biografian artikolon, li troviĝas en Aŭstralio, partoprenante la 1-an Internacian Konferencon pri polihetoj en Sidnejo — kaj sendube profitante ĉi okazon por kontaktiĝi kun aŭstraliaj samideanoj.

El mia malnova letero (de 2.12.1973) mi reprenas la bondeziran parton okaze de lia sesdekjariĝo, aktualigante ĝin per ŝanĝo de tiama priaĝa vorto: «Kara amiko, profesoro d-ro *Carl Stop-Bowitz*, venas via **sepdekjariĝo**, la grava vivjubileo, kiu alportas por mi eksterordinare agrablan devon: sincere, plenkore bondeziri al vi; gratuli pro la admirindaj sukcesoj, kiujn vi akiris

sur la kampo de ISAE (tien ja projekciiĝas viaj profundeĝaj scioj pri zoologio, lingvistiko k.a.); tosti — trans la landlimoj — je via sano, viaj neelĉerpeblaj vivenerĝio kaj optimismo... Mankas al mi trafikaj vortoj; ilin pli facile trovos viaj familianoj, viaj samlandanoj, havantaj la bonŝancon de pli proksima kaj pli ofta kontaktiĝado kun vi. Malgraŭ tio mi deziras certigi vin, ke ekde la 1-a volumo de SR, kiun vi enkondukis per via antaŭparolo de la prozora prezidanto de ISAE vi signifas por mi idealan modelon de samideano-kolego. Vi fariĝis por mi aŭtoritato.»

La verkar-listo de prof. Stóp-Bowitz

1941

Les Glycériens de Norvège. (Esperanto-resumo: La Gliceredoj de Norvegujo.) — *Nytt. Mag. Naturvidensk.*, 82. Oslo.

Sjøbunnens dyreliv (Animala vivo de la marfundo). — *Norsk Skuleblad*, 25. Oslo.

1944

Zoologisk nomenklatur (Zoologia nomenklatur). — *Skogbrukeren*, 23. Oslo.

1945

Les Ophéliens norvégiens. (Esperanto-resumo: La norvegaj Ofeliedoj.) — *Nytt. Mag. Naturvidensk.*, 85 Oslo.

Les Scalibregmiens de Norvège. (Esperanto-resumo: La Skalibregmedoj de Norvegujo.) — *Nytt. Mag. Naturvidensk.*, 85. Oslo.

Fuglekonge — Gjerdesmutt? (Birdreĝo: regolo aŭ troglodito?). — *Naturen*, 6. Bergen.

1946

Strangaĵoj el la besta vivo. — Kyara rapsodio. *Stockholm*.

1948

Les Flabelligériens norvégiens. (Esperanto-resumo: La Norvegaj Flabeligeredoj.) — *Bergens Mus. Årbok*, 1946/47, *Naturvitensk. Rek.*, 1. Bergen.

Sur les polychètes arctiques... — *Tromsø Mus. Årsh., Naturhist. Avd.*, 35, 66, 2, 1-58. Tromsø.

Polychaeta from the «Michael Sars» North Atlantic Deep-Sea Exp. 1910. (Esperanto-resumo: Polifetoj de la «Michael Sars» Nord-Atlanta profund-mara ekspedicio 1910.) — *Rep. Sci. Res. «M.S.» N.A.D.-S. Exp. 1910*, 5. Bergen.

1949

Polychètes pélagiques des expéditions norvégiennes antarctiques de la «Norvegia» 1927-1928, 1928-1929 et 1930-1931. (Esperanto-resumo: Pelagaj polifetoj de la norvegaj antarktaj ekspedicioj de la «Norvegia» 1927-1928, 1928-1929 kaj 1930-1931.) — *Sci. Res. Norw. Antarct. Exp. 1927-1928 et sqq.*, 31. *Det Norske Videnskaps-Akademi i Oslo*.

Al la membroj de ISAE. — *SCIENCA REVUO*, 1, 1, 2. *Purmerend*. 1951
 Polychètes pélagiques de l'expédition suédoise antarctique 1901-1903. — *Further Zool. Res. Swed. Antarct. Exp. 1901-1903*, 4, 7. Stockholm.
 Notoj pri kelkaj sufiksoj sistematikaj kaj priskribaj en biontologio. — *SCIENCA REVUO*, 3, 3, 106-108. *Purmerend*.

1950

Norske padder (Amphibia) (Norvegaj amfibioj). — *Fauna*, 1. Oslo.
Nytt fra Universitetes Zoologiske Museum, Oslo, I: Fugl (Novaĵoj el la Universitata Zoologia Muzeo, Oslo, I: Birdoj). — *Fauna*, 2. Oslo.
Darwin kaj la darvinismo. — *Heroldo de Esperanto*, 11/1950, 2/1951. Bruselo.

1951

Jordmesteren (La ter-majstro). — *Fauna*, 2. Oslo.
Nytt fra Universitetes Zoologiske Museum, Oslo, IV: Fisk (Novaĵo el la Universitata Zoologia Muzeo, Oslo, IV: Fiŝoj). — *Fauna*, 3. Oslo.

1953

Litt om metemarken (Iom pri la lumbrikoj). — *Fiskesport*, 10/12. Oslo.

1954

Den trina ere zoologiske nomenklatur (La trivorta zoologia nomeklatur). — *Skogbrukeren*, 18. Oslo.

1955

La termajstro. (La lumbriko, la senlaca helpanto de la terkulturistoj.) — *SCIENCA REVUO*, 6, 4, 139-146. *Purmerend*.

1958

Polifetaj novaĵoj el Norvegujo. — *SCIENCAJ STUDOJ*, 213-216. Kopenhago.
 La deveno de la homo. (Prelego en Internacia Somera Universitato, Kopenhago, 1956.) — *SCIENCA REVUO*, 9, 4, 130-140. *Purmerend*.
 La parenceco inter vertebruloj. (Prelego en Internacia Somera Universitato, Marsejlo, 1957.) — *SCIENCA REVUO*, 9, 4, 141-151. *Purmerend*.
Metemark pa sne (Lumbrikoj sur neĝo). — *Fauna*, 1. Oslo.
Metemark med tro bakender (Lumbriko kun duobla malantaŭa korpoparto). — *Fauna*, 2. — Oslo.

1963

Kiel nomi la organismojn? (Prelego en Internacia Somera Universitato, Kopenhago, 1962.) — *SCIENCA REVUO*, 13, 1-4, 110-117. Sarajevo.

1964

La eŭropa angilo tute ne frajas! (Prelego en Internacia Somera Universitato, Bruselo, 1960.) — *SCIENCA REVUO*, 14, 1-2, 56-64. Sarajevo.

1965

Esperanto — lingvo de moderna tipo. — En: *V. Setälä — E. Vilborg — C. Stóp-Bowitz*: Esperanto — moderna lingvo. (Studo baze de la Fundamento.) p. 63-134. — Fondumo Esperanto. *Helsinki*.

1966

Ĉu organismoj travivis la glaciepokon en la nordo? (Prelego en Internacia Somera Universitato, Tokio, 1965.) — *SCIENCA REVUO*, 16, 2, 57-67. *Sarajevo*.

1969

Did Lumbricids survive the quaternary glaciations in Norway? — *Pedobiologia*, 9, *Jena*.
A contribution to our knowledge of the systematics and zoogeography of Norwegian earthworms (Annelida Oligochaeta: Lumbricidae). — *Nytt. Mag. Zool.*, 17, *Oslo*.
 Birdetoj kiel ekstermantoj de insektoj. (Prelego en Internacia Somera Universitato, Helsinko, 1969.) — *SCIENCA REVUO*, 20, 3-4, 105-113. *Beograd*.

1971

Zoologia nomeklaturu. — *SCIENCA REVUO*, 22,3,79-90. *Beograd*.

1972

Bazaj nocioj de biologio. — Someraj Universitataj Kursoj. *Liège*.

1974

Enkonduko en ĝeneralan biologion. — Someraj Universitataj Kursoj *Liège*.
 Elementa ekologio. — Someraj Universitataj Kursoj. *Liège*.
 Segmentumitaj animalaj grupoj. — Someraj Universitataj Kursoj. *Liège*.
Earthworms (Annelida Oligochaeta: Lumbricidae) from Hardangervidda, Western Norway. — *Fauna of the Hardangervidda*, 6. *Zool. Mus. Univ. i Bergen*.
 Areoj de animaloj, ilia determinado kaj fluktuaĉo. — *SCIENCA REVUO*, 25, 1, 11-26. *Beograd*.

1976

La natura ekonomio de la maro. (Prelego en Internacia Somera Universitato, Kopenhago, 1971.) — *SCIENCA REVUO*, 27, 4, 135-145. *Beograd*.
 Elementa zoogeografio. — Someraj Universitataj Kursoj. *Liège*.

1977

Polychètes pélagiques des expéditions du «Willem Barendsz» 1946-1947 et 1947-1948 et du «Snellius» 1929-1930. Pelagaj polifetoj de la ekspedicioj de «*Willem Barendsz*» 1946-1947 kaj 1947-1948 kaj de «*Snellius*» 1929-1930. — *Zool. Mededel.*, 51, 1, 1-23. *Leiden*.
 Kial kelkfoje maraj moluskoj fariĝas venenaj? (Prelego en Internacia Somera Universitato, Ateno, 1976.) — *SCIENCA REVUO*, 28, 1-2, 17-29. *Beograd*.

1981

Polychaeta. — *Atlas del zooplancton del Atlantico Sudoccidental y métodos de trabajo con*


zooplancton marino. (Esperanto-resumo: Ĉapitro POLIHĜETOJ.) - INIDEP, Mar del Plata.

Norvegaj leksikonoj kaj verkoj, en kiuj prof. Stóp-Bowitz kunlaboris:

Francé, R.H. (1948): Dyrelivets undere (Mirindaĵoj el la besta vivo). *Oslo*.
Aschehoughs Konversasjonsleksikon (Enciklopedio de *Aschehough*): 61954-1962), 4-a eldono, 19 volumoj. (1968-1973), 5-a eldono, 20 volumoj. *Oslo*.
Aschehough og Gyldendals store norske leksikon (La granda norvega enciklopedio de *Aschehough* kaj *Gyldendal*) (1978-1981), 12 volumoj. *Oslo*.
Cappelens Dyreleksikon (Bestleksikono de *Cappelen*). (1979-1981), 6 volumoj. *Oslo*.
Zoo, Dyrenes liv (Zoo, vivo de la bestoj). (1977-1980). 6 volumoj. *Oslo*.
Norges Dyreliv (Besta vivo de Norvegio), Vol. IV (1950): *Landsnegler* (Teraj gastropodoj); *Metemerk og andre mark i jorden* (Vermoj en la tero). *Oslo*.
Norges Dyr (Bestoj de Norvegio), Vol. IV (1971): *Fjæremarken og dens slektninger* (Polihetoj); *Metemerkene* (Tervermoj); *Iglene* (Hiruduloj). *Oslo*.
Jordens Dyreliv, Pattedyr (Bestoj de la tero. Mamuloj). 3 volumoj (1965-19667, ĉefredaktoro. *Oslo*.

Biografiaj publikigaĵoj pri prof. Stóp-Bowitz

B. Popović (1973): La vicprezidanto de ISAE *Carl Stóp-Bowitz* 60-jarulo. — *SCIENCA REVUO*, 24, 5, 197-199. *Beograd*.
J. Kavka (1978): Jubileas du ISAE-estraranoj. — *SCIENCA REVUO*, 29, 2, 87-88. *Chapećo*.
C. Darbellay (1981): Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko, 203. *Neuss*.



Prof. d-ro Carl Stóp-Bowitz